# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 7

Ekzerco 1. Kompletigu la vortspacon.

1. Kia greno, tia ␣ ␣ n ␣.
2. Peko kaj ␣ r ␣ r ␣ estas ecoj de l’ homaro.
3. Taksi la ␣ ␣ n ␣ ␣ ni lernas en malsano.
4. Sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ␣ ␣ s ␣ ␣.
5. Ne ␣ ␣ r ␣ ␣ pri tio, kio estas ekster via scio.
6. Janica Kostelić ␣ ␣ j ␣ ␣ ␣ en Salt Lake City tri orajn kaj unu arĝentan medalojn en diversaj branĉoj de monta skiado.
7. Ekde la pratempo la scivola homo ␣ ␣ n ␣ ␣ forigadi siajn malsanojn per naturaj rimedoj.
8. Ĉe la ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ pordego atendis la servistinoj.
9. Irena estis la plej ␣ ␣ **r** ␣ estaĵo en la vivo de Ros.
10. Tiu pentozo (aŭ kvinkarbona s ␣ k ␣ r ␣) estas komponanto de diversaj biologie gravaj molekuloj.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Oskaro, aĝante tri jarojn, falas en p ␣ ␣ f ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ kelon kun okaze nefermita klapo.
2. La s ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ estis senhomaj, turpaj, la kafejoj malplenaj kaj neniu kuraĝis eniri en ilin, kvazaŭ tie eksplodus bombo.
3. En la p ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ p ␣ de 2002 *Bayerische Landesbank* retiriĝis el Kroatio.
4. Sed nun estas aŭtuno, la suno ne brilas, la n ␣ b ␣ ␣ kaj la maro estas grizaj.
5. Sur la p ␣ ␣ n ␣ ␣ estis ĵetitaj paneroj, kaj tabaka cindro estis videbla eĉ sur la tablotuko.
6. Nun via s ␣ ␣ g ␣ estas plena de adrenalino pro la anestezilo, sed poste vi eble deprimiĝos.
7. Oni diris, ke sur tiu ĉi senarbejo, ĉe la fonto, iam estis bela blanka monaĥejo, simila al kolombo, sidiĝanta sur la v␣ ␣ d ␣ senarbejo, inter la jarcentaj kverkoj.
8. La tezoj, antitezoj kaj sintezoj estas faritaj de homoj, kiel diris Lenino, de “la u ␣ ␣ l ␣ ␣ idiotoj”.
9. La registaro promesis antaŭenigi la ekonomion, ĉefe per eksportoj, kaj lukti por justa, tutmonda k ␣ m ␣ r ␣ ␣.
10. La vilaĝo estis eta, k ␣ ŝ ␣ t ␣ ĉe la piedoj de Balkano.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| pret’, ord’, koler’, ripoz’, vend’, pardon’, elekt‘, kalkul’, frap’, dik‘. |

1. La lignoŝuojn ja oni produktas el poploligno kaj ornamas per ledaj akcesoraĵoj, kiujn lokaj manlaboristinoj ␣ ␣ ␣ t ␣ g ␣ ␣.
2. Della kuris supren je unu ŝtuparo kaj ␣ ␣ d ␣ g ␣ ␣ sin anhelante.

3. Oni povas dividi ilin je konsumantoj kaj produktantoj, ␣ ␣ k ␣ ␣ ␣ ␣ kaj magruloj ktp.

4. Estas laŭdata la ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ m ␣, mallaŭdata la kolero kaj la uzado de la lango devas esti tre singarda.

5. Estis sciate, ke Bodson estas ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ m ␣ persono, kun kiu malfacilas kunlabori.

6. Se vi bone faris la kalkulojn, tiam la rezultoj estos perfektaj; kontraŭe, vi eraris – do, uzu ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ l ␣ ␣.

7. En la sama momento io ␣ k ␣ ␣ ␣ p ␣ ␣ tute laŭte en la interno de la tirkesto, kie kuŝis la pupo de Ida.

8. Niaj gefratoj el Kosovo preferas jam la marplaĝojn kaj ␣ ␣ p ␣ ␣ ␣ j ␣ ␣ ␣ de Albanio al tiuj de Montenegro.

9. Furoras ␣ ␣ n ␣ ␣ j ␣ ␣, kie eblas aĉeti finkuiritajn manĝaĵojn por krei hejme t.n. tujan "luksan vespermanĝon".

10. La internacia ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ n ␣ ␣ r ␣ atribuis al vi la laŭrojn pro tri meritoj.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. La proponaro de la vilaĝestro estis aprobita, sed estas ___, ĉu cigaredvendistoj obeos ĝin.
   a. repondinde b. aĉetinde c. dubinde d. manĝinde
2. Tiu ĉi sciencisto ne ___ por subteni sian eltrovon: li publikigis sian verkon kaj pruvon kaj jen ĉio.
   a. manĝis b. dormis c. batalis d. melkis
3. Roza, lia edzino, jam kuiris la kafon kaj ___ kafaromo plenigis la manĝejon.
   a. ĵaluza b. eminenta c. inklina d. agrabla
4. Ne nur la vojoj estas en bona ___ sed ankaŭ la enurba trafiko notinde pliboniĝis.
   a. stato b. saŭco c. pulvoro d. revuo
5. Ĉio multekostas kaj vegetaĵoj preskaŭ malestas pro manko de ___.
   a. rato b. simio c. pluvo d. regalo
6. En tre malvarma ___ oni povas plivarmigi la fingrojn pugnigante la manojn, kun dikfingro inter la ceteraj fingroj.
   a. reklamo b. trotuaro c. vetero d. stango
7. En Antarkto la ___ abundas kaj amasiĝas dum longaj periodoj en valoj kaj deklivoj.
   a. strio b. trajno c. ŝelo d. neĝo
8. Ĉu ni trinku plian ___ da portero?
   a. trajton b. virton c. glason d. pupon
9. En la tablotenisa sekcio nun trejnas sin homoj de ĉiuj ___; ankaŭ mi.
   a. kaĝoj b. aĝoj c. revuoj d. sklavoj
10. Tiel vi povas moviĝi ankaŭ dekstren-maldekstren antaŭ la ondokresto proksimiĝante al la ___.
    a. bordo b. ŝraŭbo c. trezoro d. veneno